
Juan Antonio

# 44-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 6-a ĝis la 12-a de Julio
1984

## SEVILJO

KONGRESLIBRO



# La Espero

## Himno esperantista




0909

# 44-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Juan Antonio Giménez
Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19.ª
46007 VALENCIA

6 - 12 Julio 1984
SEVILLA
ANDALUCIA

IMPRENTA J. DE HARO - FABIÉ, 31 - SEVILLA



D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859 – 1917)

# Honora komitato

Excmo. Sr. Ministro de Transportes, Turismo y Comunicaciones,
D. ENRIQUE BARON CRESPO

Excmo. Sr. Presidente de la Junta de Andalucía,
D. JOSE RODRIGUEZ DE LA BORBOLLA Y CAMEYAN

Excmo. Sr. Delegado General del Gobierno en Andalucía,
D. LEOCADIO MARIN RODRIGUEZ

Excmo. Sr. Gobernador Civil de la Provincia de Sevilla,
D. ALFONSO GARRIDO AVILA

Excmo. Sr. Presidente de la Diputación Provincial de Sevilla,
D. MIGUEL ANGEL DEL PINO MENCHEN

Excmo. Sr. Alcalde Presidente del Ayuntamiento de Sevilla,
D. MANUEL DEL VALLE AREVALO

Excmo. Sr. Rector Magnífico de la Universidad de Sevilla,
D. RAFAEL INFANTES MACIAS

Excmo. Sr. Consejero de Educación de la Junta de Andalucía,
D. MANUEL GRACIA NAVARRO

Ilmo. Sr. Delegado Prov. del Ministerio de Transp., Turismo y Com.,
D. JOSE BRAVO MARTIN

Ilmo. Sr. Director de Instituto de Enseñanza Media,
D. ANGEL ARRANZ ALONSO

Doña MARIA DE LOS ANGELES INFANTE GARCIA

## Estraro de Hispana Esperanta Federacio

Honora Prezidanto: D-ro. Miguel Sancho Izquierdo.
Prezidantino: D-rino. M.ª RAFAELA URUEÑA ALVAREZ.
Vicprezidanto: S-ro. Angel Díez García
Sekretario: S-ro. Luis Hernández García.
Vicsekretariino: F-ino. M.ª Jesús Martín Andrés.
Kasistino: F-ino. Carmen Conde Labajo.
Voĉdonanto: S-ro. Pedro Nuez Pérez (†)
Voĉdonanto: S-ro. Víctor Ortiz Gratal.
Voĉdonanto: S-ro. Francisco Zaragoza Ruiz.
Voĉdonanto: S-ro. Adonis González Meana.
Voĉdonanto: S-ro. Tomás Caspe Cereijo.
Libroservanto de H.E.F.: S-ro. José González Suárez.
Redaktoro de "Boletin": S-ro. Salvador Aragay Galbany.

## Organiza kongresa komitato

Honora Prezidanto: Mosta S-ro. Rafael Fiol Paredes.
Prezidanto: S-ro. Manuel Ramírez Cepeda.
Vicprezidanto: S-ro. Victoriano Márquez Vega.
Sekretario: S-ro. José Pavón Arreciado.
Vicsekretario: S-ro. Alberto Franco Ramírez.
Kasisto: S-ro. Tomás Caspe Cereijo.
Komitatano pri junularo kaj gastigado. S-ro. Antonio Rguez. Gasch.
Komitatano pri Publikaj rilatoj: S-ro. Felipe González del Pino.
Komitatano pri informado: S-ro. Francisco Portal Acosta.
Komitatano pri Kulturo kaj Sporto: S-ro. Juan de Dios Montoto.
Komitatano pri Propagando: S-ro. José Cintas Vaquero.
Kongresa Libroservo: S-ro. Luis Gilpérez Fraile.

# Saluto al la gekongresanoj



Karaj gekongresanoj:

Mi salutas kaj bonvenigas vin el la paĝoj de nia kongreslibro, ĉar certe estas por ni ĉiuj grava evento tiu ĉi 44-a Kongreso en Seviljo, urbo kie de la jaro 1928-a ne reokazis alia Hispana Esperanto-Kongreso.

Ĉifoje ni havos okazon pritrakti la temon **"Turismo, ĉu socia fenomeno?"**, ĉar ne vane Seviljo estas fokuso altiranta turismamantojn, kaj por ni esperantistoj la vorto "turismo" signifas iom pli ol vagadi tra la urbo rigardante artaĵojn, aŭ ĝuante folklorajn aspektojn. Ni profitos la kongreson por labori kun la celo vigligi nian esperantistan estontecon, por omaĝi la Seviljajn veteranojn, por interŝanĝi vidpunktojn, sed ne preterlasante la turisman flankon, ĉar Seviljo enhavas riĉegan kulturon. Ni pensas pri ĝia romia deveno, aŭ la visigota epoko kiam la Skolo de Sankta Isidoro de Seviljo gardis la latinan kulturan heredaĵon kaj estis vera ponto inter la malaperiginta klasika Antikveco kaj la naskiĝanta Mezepoko, aŭ pri la kulturo de "Al Andalus" enhavanta grandiozan civilizacion.

La graveco de Nebrija, komencanto de la Renesanco en Hispanio, kaj la fama Sevilja Skolo de poezio, kiu je la fino de la 18-a jarcento estis unu el la fokusoj ideologie plej avangardaj.

Ni ĉiuj memoras pri Velázquez, Murillo, Valdés Leal kiuj naskiĝintaj en Seviljo devenis universalaj.

Kaj se ni havas liberan momenton en la varma etoso de la Sevilja klimato kaj de nia propra kongreso, ni ĝuos kontemplate la Giralda-n, aŭ vagante tra la Maria Luisa Parko, unu el la plej belaj kaj ripozigaj el la mondo, kie ni vidos la monumenton al Bécquer, kiu sciis redukti la poetikan romantikan mondon al la esenco de la beleco mem.

La membroj de la L.K.K. laboradis senĉese, junaj kaj ne junaj kune kaj samcele por ke nia Kongreso sukcesu, malgraŭ la multaj malfacilaĵoj kaj la ekstera neintereso troviĝantaj. Kaj tio meritas nian apogon kaj gratulon, partoprenante aktive en ĉiu programero, laborante entuziasme kaj tolereme.

Mi deziras fruktodonan Kongreson ĉiam en vera esperantista etoso.

**M. R. URUEÑA**
(Prezidantino de H. E. F.)

## Bonvenon al la gepartoprenantoj de nia ĉi-jara Kongreso

Estimataj gesamideanoj!

Kiam oni vizitas landon oni kutimas bonvenigi per rideto aŭ io simila. Sed certe tiu rideto ŝanĝiĝos ridetegon se tiu alvenanto estas samlingvparolanto. Sed, se tiu lingvo unuiganta estas tia lernita klopode kaj ame, ankoraŭ pli memkompreneblas, ke la menciita ridetego fariĝos kiel eble plej bonveniga. Vi komprenos, do, ke estas nia intenco bonvenigi ne nur per rideto, sed per elkora amikeco.

Karaj gesamideanoj: ni devas konscii, ke pere de la Kongreso eble ni ne povos vidigi al sevilaj neesperantistoj tutklare kia estas la "ĉies lingvo", tiel lerniga kaj avantaĝa. Tamen, ni povos konigi kiel esperanto rolas ne nure kiel neŭtrala kaj internacia lingvo, sed ankaŭ kiel vera ilo por kompreniĝi kaj sekve eviti malamon sur la terglobo. Tio ja estos dankota de la Sevilja popolo, kies bonvenigo videbliĝos per ridetego tutcerte.


Ni esperas la plej sukcesan disvolviĝon de la Kongreso des pli, ke trapasis 55 jarojn, kiam tiu lasta okazis. Tio klarigas kiel gravaj estas niaj streboj kaj kial ni malŝparis ĉiajn klopodojn.

Alie, ni devas danki tiom da personoj kaj institucioj, kiuj iel helpis la kongreson, ke ne estas sufiĉe da spaco por tion fari.

Estu tiel, ke nia urbo estos rememorata ne nur pro sia varmego vetera, sed ankaŭ homa. Por tion atingi necesas ĉies partoprenado. Tial, paroli esperante, kunlabori ian ajn aranĝon, alporti fruktodonajn ideojn por venontaj kongresoj, konigi eblajn erarojn, ktp, devas esti ĉies tasko. Nur tiamaniere ni ĉiuj atingos niajn celojn perfektigi nin parole kaj disvastigi nian karan lingvon. Kaj sekve, nia bonvenigo ne nur estos ridetego, sed ĉiama dankemo.

**La L. K. K.**

# Manuel Figuerola Palomo



Naskiĝinte en Zaragoza la jaron 1941-a, li doktoriĝis en Ekonomiaj kaj Komercaj Sciencoj. Li laboris kiel Profesoro en diversaj Liceoj kaj en la Universitatoj "Complutense" kaj Politeknika de Madrido, kaj de Carabobo (Venezuelo). Nuntempa Profesoro en la Oficiala Lernejo pri Turismo, sia profesio rilatas plene al la temo de nia Kongreso, ĉar ne vane per kursoj, seminarioj, esplorado, enketoj, statistikoj k.t.p. li ĉiam laboris por la Turismo.

Li estas autoro de multaj kaj interesaj verkoj pri turisma ekonomio aŭ de diversaj sciencaj temoj, kaj ankaŭ li verkis sciencajn artikolojn rilatantaj la turismon aperintaj en ĵurnaloj kaj revuoj.

Oni elstaras unue sian oficialan partoprenon kiel membro de hispanaj delegacioj en Internaciaj Organizoj kaj Mondaj Konferencoj (ekz. OCDE, Monda Turisma Organizo, Unuiĝintaj Nacioj, k.t.p.) kaj due la prezentadon de diversaj raportoj en kongresoj de la IATA; kaj Monda Turisma Organizo en Madrido, Manila kaj Meksikio, samkiel en internaciaj kunsidoj.

De la jaro 1969-a li estas membro de la teknika kabineto pri esploro de la Hispana Instituto pri Turismo, kaj de la jaro 1974-a Direktoro de la Kabineto pri Ekonomiaj kaj komercaj Studoj de ĉi tiu Hispana Instituto.

Li estas senĉesa preleganto, ĉu en nia lando, ĉu eksterlande, ĉefe en la kandro de turismaj organizaĵoj.

Sed ni esperantistoj devas elstari ankaŭ sia aktivado en nia Esperantista Movado. Li deĵoris kiel kasisto en la 53 Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Madrido la jaron 1968-a, dum tempo li laboris kiel kontregistrito por la Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, kaj ni ĉiuj memoras lin kiel pasintan Sekretarion de Hispana Esperanto-Federacio.

Ĉijare estas por ni granda honoro ricevi lin kiel festparolanton en nia Kongreso.

# "Seviljo, ĉiama artujo"



Seviljo, unu el la Ĉefurboj de Andaluzio, situanta sude de Hispanio, estas interkruciĝejo de la civilizacioj plej gravaj, kiuj trapasis la Iberian Duoninsulon. Ili lasis sian postsignon ĉe plenfamaj monumentoj, je kiuj ankoraŭ la turisto, la vizitanto, povas miri. Tiel, ni havas allogajn ekzemplaĵojn de la romia, araba kaj kristana popoloj. Seviljo estas ankaue naskigloko de romiaj imperiestroj, de grandaj verkistoj, poetoj, pentristoj kaj skulptistoj.

Pro sia graveco dum la pasinto ĝi meritis esti nomumita "La Ateno de la Sudo". Seviljo kapablis daŭrigi sian intan gloron per disvolviĝo en modernan industrian klopodon. Graveta estas, aktuale, ĝia metiarta laborado: ornama, ceramika, broda, oraĵa, bilda, ktp.



Inter ĝiaj historiaj famuloj menciindas la imperiestroj Adriano, Trajano kaj Teodosio. Inter ĝiaj plej eminentaj artistoj memorindas Diego de Silva y Velázquez, la "pentristo de la vero", la altfama B. E. Murillo, Valdés Leal, Herrera el Viejo, Juan de las Roelas, Francisco Pacheco kaj aliaj grandaj artistoj, el kiuj kelkaj, kvankan nedenaskaj seviljanoj, estis kulturitaj ene de la unuaranga sevilja skolo kiel, ekzemple, Francisco de Zurbarán.

Vaste mondkonatas ankaŭ ĝia poezia kaj literatura skolo, kiu vivigis popularajn rolulojn similajn al Rinconete kaj Cortadillo. Reliefigindas la poeto Herrera kaj gravaj mistikuloj aŭ pieculoj kiel Miguel de Mañara.

Famega same estas la gigantesca kvalito de ĝiaj skulptistoj, kie elstarigas, sekve de la skolo fondita de Torriggiano Torriggiani, Jerónimo Fernández, Pedro Roque Valduque, Juan Martínez Montañés, Juan de Mesa, Pedro Roldán kaj lia filino "la Roldana", konsiderata la skulptistino plej ranga el tiu epoko... Definitive, la multenombraj artaj monumentoj de Seviljo (Katedralo, Sankta-Kruca Kvartalo, la Ĝenerala India Arĥivejo, ktp...) estas la postlasa restaĵo pli simptoma de tia historiplena urbo. Ĉiuj ili estas, baldaŭ, eladmirotaj de vi, kara kongresano.

**Manolo RAMIREZ**

# 44-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

(Seviljo, de la 6-a ĝis la 11-a de Julio 1984)

TEMO: "Turismo, ĉu socia fenomeno?"

KONGRESEJO: I. B. Velázquez (Carrión Mejías, 10)

# KONGRESPROGRAMO

**VENDREDON, 6-an**

De la 10-a matene: Disdonado de dokumentoj.

20,00 h.: Vespere: Vizito al la Reĝaj Alkazaroj.

**SABATON, 7-an**

9,00 h.: **Kunveno de HEF-estraro kun delegitoj de grupoj kaj sekcioj.**

12,00 h.: **Solena inauguro** (S-ro Figuerola parolos hispane pri la kongrestemo).

Oficiala foto.

19,00 h.: **Seminario pri turismo** (estras S-ro Figniera).

21,30 h.: Junulara vespero (en la Sankta Kruca Kvartalo).

**DIMANĈO, 8-an**

10,00 h.: Kunveno de redaktoroj de E-revuoj kaj gazetoj.

11,30 h.: **Fakaj kunvenoj** (H.E.J.S., H.E.F.A., I.L.E.I., ktp)

19,30 h.: Ŝipa promenado tra la Gvadalkiviro. Rendevuejo "Torre del Oro"

**LUNDON, 9-an**

9,30 h.: **Ĝenerala kunveno de H.E.F.**

13,00 h.: **"Esperanto inter planlingvoj", prelego de S-ro katedristo Manuel Ramírez Cepeda.**

19,00 h.: Omaĝo al la veteranoj. Saluto de la grupoj.

21,00 h.: Folklora prezentado.

**MARDON, 10-an**

9,00 h.: Duontaga vizito traurba.

18,00 h.: Oficiala prezento de "Sferoj 3". Prezentado de Filozofia Asocio Tutmonda al la kongresanoj interesigontaj.

19,00 h.: **Laborkunsido de Hispana Jubilea Komisiono.**

20,30 h.: **Solena fermo de la kongreso.**

22,00 h.: Bankedo. Restoracio "Yantar", c/ Ortiz de Zúñiga, 8 (San Pedro).

**MERKREDON, 11-an**

Tuttaga ekskurso al Jerez, Plaĝo Valdelagrana kaj Arcos.

**ĴAŬDON, 12-an**

Postkongresa tago. Libervolaj vizitoj tra la urbo.

**Rimarko:** En la Kongresejo funkcios libroservo de HEF gvidata de S-ro Luis Gilpérez Fraile.

# Seviljo: Skizo de ĝia movado

Kiam ni troviĝas praktike jam ĉe la Nacia Kongreso ĉijara, en la memoron de la seviljaj geesperantistoj alvenas historia dato, ŝlosila okazintaĵo, kiu signifas por ni neeviteblan defion sed, ankaŭe, kuraĝigan stimulilon. Mi rilatas la preskaŭ unikan precedencon, kiu, volenevole, pezadas kaj influadas konscie au nekonscie sur la nuntempajn seviljajn L.K.K.-anojn: la VII-an Hispanan Kongreson de Esperanto, estigitan en Seviljo dum novembro de 1928.

Gravega, transnacie konata evento, kiu pruvas, ke tiam la Giralda urbo jam aktivadas internacilingveme. Efektive, la unuaj paŝoj fare de la sevilja esperantismo estis irataj en 1910, kiam la ĉiurba Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando organizis esperantajn kursetojn, gvidatajn en la strato Rioja. Sekve de tia pionira aktivaĵo stariĝis la Sevilja Esperanta Grupo, kiu, boneplibone, vivadis proksimume ĝis la jaro 1955-a. Okazis poste duonsilenta, preskaŭ disiga periodo, intera, kiu, kvankam supraĵe malaktiva, estiĝis tamen la germiĝejo de la aktuala sevilja E-a periodo, naskita dum la jaro 1975-a fare de aktivuloj kiel Felipe González del Pino, Antolín Colmenar kaj aliaj samideanoj. Kristaliĝo de ci tiu dua epoko estas la fondiĝo samjare de la Sevilja Esperanta Akademio...

La historio de la Sevilja Movado videbliĝas, do, zigzaga kaj malregula. Sed, vere, ekde ĝia frumatenigo ĝis hodiau fluas konstanta, seninterrompa evoluada linio, kiu antaueniris diversmaniere:

Kelkfoje, pere de plimalpliaj sistemaj renkontiĝoj en domoj au publikejoj (antikva kafejo «Coliseo», tiptrinkejoj de «El Arenal»...)

Ankaŭfoje, fare de la ekzemplo kaj la varbemo de simpatiantaj eminentuloj kiel Blas Infante aŭ la pastro Jerónimo de Córdoba, aŭ fare de iniciatoj estigitaj en kelkaj grandaj entreprenoj de la urbo kiel «Hispano Aviación», en 1957.

Alifoje, dank' al nelaciĝa dediĉado al la movado de S-ro. Rafael Fiol Paredes, kiu, ekde la pioniraj jaroj, korespondadis esperante kun multenombraj personoj kaj ricevadis au gastigadis multegajn geesperantistojn alvenintajn Seviljen pro turismo au aliaj kialoj... Moŝta S-ro. Rafael Fiol (kiu, plinaudekjara jam, ankoraŭ aktivas movade) estas la Honora Prezidanto de la ĉijara Kongreso kaj konservas, kaŭze de sia longdaura esperantismo, valoregan fotaĵan, bildkartan kaj poŝtmarkan kolekton, palpeblan testaĵon de sia laŭdinda esperanta korespondado. Li kaj aliaj aktivuloj estos omaĝataj ĉikongrese, jae.

Finfine, alia referenca punkto de la sevilja esperantisma historio estas la jam menciita Nacia Kongreso de 1928, ĉe kiu memorendas ĝiaj organizintoj, la tri grandaj M: S-roj Mojado, Martínez kaj Mangada. Ĝia raportlibro legindas kiel dokumenta trezoraĵo, kie oni detalume informas pri ĉiu ajn tiama kongresero: salutvortoj, programo, ekskursoj, literaturaj konkursoj, festoj, decidoj, listo de gekongresanoj (entute, 391 aliĝintoj!), ktp. Resume, vera historia juvelo, kiun ni ĉiuj povos miri ekspozicie dum nia ĉijara Kongreso kie, krome, okaze de la Omaĝo al la Veteranoj, oni plidissciigos pri la historio de la Esperanta Movado de Seviljo, la urbo ema vin plejgastigi, karan samideanon.

Ĉi tiu pionira Kongreso ĝuis la altan protektadon de la Reĝa Moŝto Alfonso XIII-a, atingis tutan elspezaron valore de 4.203 pesetoj kaj, interalie, ricevis la ĉeeston de eksterlandaj E-aj famuloj kiel la franca S-ro. Th. Cart.

Kaj... la movado pluiĝas onte...

¡FELIĈAN KONGRESUMON!

**MANUEL RAMIREZ**

# *Al la junularo*

Denove, ni, junuloj de la tuta Hispanio, havos Plian ŝancon renkontiĝi, ĉi jare sub la suno de la Giralda Urbo.


Precipe, per ĉi artikolo, mi volus komuniki al ĉiuj, ke la Kongreso apartenas al ĉiuj. Ni ne devus fari distingojn ekzemple dirante, ke la tendaro estas por junuloj kaj la kongresoj de somero por maljunloj. Almenaŭ, en ĉi Kongreso ni esperas, ke la junularo ludos gravan rolon, kaj mi ne diras la plej gravan rolon, ĉar kiel mi antaŭe menciis, la Kongreso estas ĉies aranĝo. La junularo, en nia Kongreso estos sub nenio kaj sub neniu. Almenaŭ en Seviljo ĉiam okazas tiel. Kune kun la nejunuloj, ni devas atingi, ke la Kongreso vere ĉarmiĝos. La bona kunlaboro inter ĉiuj vere atingos, ke la Kongreso plenumos sian celon. Se ni hispanaj esperantistoj ne atingas interkomprenon inter ni mem, kiel ni atingos la interkomprenon en la cetera mondo. Ĉi tiu estas afero solvebla kaj solvenda, ĉar kontraŭe la Kongreso estigus hipokrita.

Dum unu jaro, la junularo de SEJO strebis al vera realiĝo de la sufiĉaj kondiĉoj por bona akceptado kaj restado de ĉiuj junuloj. Ni pretigis restadon senpagan, ne sufikse luksan sed tre taŭgan. Ni ankaŭ pretigis programon kun junularaj aranĝoj. Sed ĉio plenumiĝos dum la kongrestagoj. Ĉiuj ni kune devos transformi la projektojn en realan praktikon.

Unuafoje, la membroj de SEJO, kiel hispanaj junaj esperantistoj akceptos kaj atendos plenplene la ceteran hispanan junan esperantistaron, ĉar ni estas la samaj, ni havas la samajn strebojn, dezirojn kaj iluziojn. Bonvenon kaj ĝuu ĉion!

**Alberto FRANCO**

# «La Arĥivo de Indioj»



Ci tiun konstruajon ordonis fari la Rego Filipo II-a inter la jaroj 1584 kaj 1598 por ke en gi kunvenu la komercistoj kaj faru siajn komercsangojn, car antaue ili faris tion ce la Katedralo, kaj kiam alfluis multaj komercistoj preskau invadis la templon. Gin skizis la fama Juan de Herrera kaj realigis Juan de Minjares kaj J. de Vandelvira, kiuj antaue konstruis la monumentan "San Lorenzo de El Escorial"-n.

En 1785 la "Floridablanca" grafo ordonis la starigon en ci tiu konstruajo de la "Generala Arhivo de Indioj", post kelkaj transformigoj kiel la stuparo kaj la korto.

Gi estas belega konstruajo kadroforma planko tipe renesanca de la XVI-a jarcento, kun stonoj "jerez-aj", du etagoj kaj grandega centra korto. La tuta konstruajo estas cirkauita de granitaj kolonoj kunigitaj per feraj cenoj kiel simbola defendo. Krome, tiuj cenoj indikas, ke la konstruajo havas la "rajton de azilo", kiun la lego konsedis al kelkaj gravaj centroj. La korto de la centro cirkauita de dorikaj kolonoj, havas en sia centro belegan fontanon, kiu taugas kiel baseno por stauto de la eltrovinto de la Amerikoj, Cristóbal Colón.

La tuta esemblo, tre simpla, estas unu el la plej gravaj monumentoj de Seviljo, pro sia granda amplekso, beleco, ornameco, ktp.

Sed, ni eniru en ĝin tra simpla pordo, kaj, post rigardi la belegan centran korton, ni supreniru tra la grandega duvica ŝtuparo por atingi la unuan etaĝon. Ĉi tie ni povos admiri la ampleksajn galeriojn (flankitaj de grandaj ŝrankoj fabrikitaj de riĉaj lignoj koloniaj) kaj meze de ili, belegajn vitromeblojn, kie oni montras iujn el la plej rimarkindaj dokumentoj kiujn la Arĥivo enhavas.

En tempo de la bona Reĝo Carlos III-a, oni organizis denove la arĥivon ampleksigante ĝin kaj riĉigante per novaj donacoj kiujn faris aliaj arĥivoj de la lando: dokumentoj, mapoj de la Okcidentaj kaj Orientaj Indioj. Tiel, ĉi tie kunvenis la plej grava amaso de paperoj rilatantaj al Ameriko.

Ĉion ĉi havas grandaj salonoj, ŝrankoj, ktp, ekzemple, buleojn de la Papo Aleksandro II, La Testamento de Juan Sebastián Elcano, leterojn de Vasco Núñez de Balboa, kontojn de la komercŝanĝoj faritaj tiom en la havenoj de Seviljo kiom en tiu de Kadizo, detalajn studojn pri riveroj, maroj, montoj, plantoj, animalspecoj de la lontana kontinento.

Proksimume pli ol 40.000 grandaj legaĵoj kaj ĉirkaŭ 6.000 mapoj enhavas la Arĥivo, kaj estas ĝi grava historia ejo al kiu alfluas multaj esploristoj por fari siajn studojn kaj kontroli faktojn kaj konitaĵojn, estante ĉi tie granda facileco ne nur por la studo sed ankaŭ por atingi fotokopiojn, mikrofilmojn, ktp.

Resume, la "Arĥivo de Indioj" de Sevijo, iama borsdomo, estas kultura centro kun granda historia graveco, kiu meritas viziton fare de la anoj de ĉi kongreso nacia de esperanto por akiri ideon pri tiamaj tempoj de tiuj landoj amerikaj en kiu tiom multe enradikiĝis nia helpa lingvo, kie loĝis multe el niaj prapatroj kaj kie la nunaj loĝantaroj estas konsiderataj kiel fratoj.

**Rafael FIOL PAREDES**

# *Listo de aliĝintaj kongresanoj ĝis la momento de la ekpresado*

| N.° | Aliĝinto | Urbo-lando |
|---|---|---|
| 1. | Rafael Fiol Paredes | Sevilla |
| 2. | Asociación Sevillana de Esperanto | » |
| 3. | Academia Sevillana de Esperanto | » |
| 4. | Sevilja Esperanta Junulara Organizo | » |
| 5. | M.ª Rafaela Urueña Alvarez | Valladolid |
| 6. | Luis Enrique Hernández García | » |
| 7. | Tomás Caspe Cereijo | Sevilla |
| 8. | Ana Chica Callejón | » |
| 9. | Manuel Ramírez Cepeda | » |
| 10. | Felipe González del Pino | » |
| 11. | José Pavón Arreciado | » |
| 12. | María Mejías Campo | » |
| 13. | José Morón Bravo | San José Rincon. (Sevilla) |
| 14. | Carlos Méndez | Sevilla |
| 15. | Linette Bellocq | » |
| 16. | Alberto Franco Ramírez | » |
| 17. | Francisco Portal Acosta | » |
| 18. | Eduardo González Ordóñez | » |
| 19. | Virginia Márquez Martín | » |
| 20. | Gian Carlos Figuiera | Madrid |
| 21. | Luis Serrano Pérez | Sabadell |
| 22. | V. Hernández Llusera | » |
| 23. | Antonia Lapuerta Palacios | Zaragoza |
| 24. | Herminia Gil Alvarez | » |
| 25. | Fermín Urmeneta Cervera | Barcelona |
| 26. | Andrés Martín González | Málaga |
| 27. | Bienvenida Tovar Tovar | » |
| 28. | José María González Aboín | Madrid |
| 29. | José Palmero Pérez | La Laguna (Tenerife) |
| 30. | J. Palmero Pérez | » » » |
| 31. | J. Palmero | » » » |
| 32. | Fca. Javier Yruegas del Río | Madrid |
| 33. | Luis Gilpérez Fraile | Sevilla |
| 34. | Antonio Rodríguez Gasch | » |
| 35. | Dolores García Perea | » |
| 36. | Grupo de Esperanto «Fido kaj Espero» | Valladolid |
| 37. | María García Martín | » |
| 38. | Carmen Conde Labajo | » |
| 39. | Inés Gastón Burillo | Zaragoza |
| 40. | Evaristo Gil Pallarés | Barcelona |
| 41. | Salomé Sancho Rebudilla | Zaragoza |

| N.º | Aliĝinto | Urbo-lando |
|---|---|---|
| 42. | M.ª Pilar Sancho Rebudilla | » |
| 43. | Astura Esperanto Asocio | Gijón |
| 44. | Adonis González Meana | » |
| 45. | Angelita Vega Rodríguez | » |
| 46. | Julio Argüelles García | » |
| 47. | Isabel García Menéndez | » |
| 48. | Gervasio Colunga Fernández | » |
| 49. | Manuel Fernández Suárez | » |
| 50. | Argentina García Ceñal | » |
| 51. | Francisco Zaragoza Ruiz | Callosa de Segura |
| 52. | Josefina Braem van Pereghem | » » » |
| 53. | Julio Herrero Segura | Málaga |
| 54. | Paqui Corrales Guerrero | » |
| 55. | Rafael López Castilla | » |
| 56. | María José Quesada Mejías | » |
| 57. | Manuel López Serna | Alicante |
| 58. | Concha López Hernández | Rafal (Alicante) |
| 59. | Alvaro Mellado López | » » |
| 60. | Ezequiel Mellado López | » » |
| 61. | Zaida Mellado López | » » |
| 62. | Manuel López Hernández | Alicante |
| 63. | Concha Hernández Ballester | » |
| 64. | Enrique Arnau Prosper | Cheste (Valencia) |
| 65. | Carmen Arnau Prosper | » » |
| 66. | Francisco Manzaneda Tarín | » » |
| 67. | Ricardo Manzaneda Tarín | » » |
| 68. | Manuel Rodrigo Ballester | » » |
| 69. | Elisa Cervera Tamarit | » » |
| 70. | Ernestina Tamarit Tamarit | » » |
| 71. | Pilar Guillén Máñez | » » |
| 72. | Juan Fernández Borrell | Perpiñán (Francia) |
| 73. | Ramón Rodríguez Peña | Tenerife |
| 74. | Vicente Molins Reig | Callosa de Segura |
| 75. | Diego Biedma Alvarez | Cádiz |
| 76. | Angel Mañero González | Valencia |
| 77. | Miguel Angel Sancho Pardo | Madrid |
| 78. | Francisco Uceda Flores | Baeza (Jaén) |
| 79. | Miguel Martínez Martín | Zaragoza |
| 80. | M.ª Teresa Ramírez | » |
| 81. | Rafael Avalos Fernández | Lora del Río (Sevilla) |
| 82. | Faustina Martínez Guillén | Vilanova i la Geltrú |
| 83. | Mari Carmen Nieto Moreno | » » |
| 84. | Jorge Camacho Cordón | Madrid |
| 85. | Ramón Giménez Feliú | Barcelona |
| 86. | Juana Coll de Giménez | » |
| 87. | José Cintas Vaquero | Sevilla |

| N.° | Aliĝinto | Urbo-lando |
|---|---|---|
| 88. | Juan de Dios Montoto Sarriá | » |
| 89. | Carles N. Moya Seguí | Valencia |
| 90. | Félix Gómez Martín | Madrid |
| 91. | Julia de la Cueva de Gómez | » |
| 92. | José M.ª Bernabéu Franco | Callosa de Segura |
| 93. | Dolores Egea Estañ | » » |
| 94. | Fernando Costa | Matosinhos (Portugal) |
| 95. | Carlos Castañón Adalia | Valladolid |
| 96. | J. Antonio Giménez García | Valencia |
| 97. | M.ª Isabel Bent Miralles | » |
| 98. | «Frateco» Esperanta societo | Zaragoza |
| 99. | Ramón Martí Sanz | El Puntal (Sevilla) |
| 100. | Rosa Blay Calatayud | » » » |
| 101. | Julián López Morales | Bilbao |
| 102. | Carmen Alvarez López | Valladolid |
| 103. | Jacinto Urueña Antón | » |
| 104. | María Luiza Niny Mexia | Lisboa (Portugal) |
| 105. | Grupo de Esperanto «Paco kaj Amo» | Vigo |
| 106. | Julio Bueno Cortés | » |
| 107. | Josefina Fernández López | » |
| 108. | Rosa Costas Bastero | » |
| 109. | Pilar Montenegro Sanjurjo | » |
| 110. | Celestino Pousa Veloso | » |
| 111. | Jaime Canoa González | » |
| 112. | Pío Moa Banga | » |
| 113. | José Ivern Mas | Barcelona |
| 114. | José Climent Grañana | » |
| 115. | Leoncio García García | Sevilla |
| 116. | Adela Tabernero Pérez | » |
| 117. | Federico Alberich Jofre | Barcelona |
| 118. | Leslie Martin | Jimena de la Frontera |
| 119. | Gerardo Flores Martín | Madrid |
| 120. | Antonia García Montemayor | » |
| 121. | Francisco Sánchez Antón | Alicante |
| 122. | Martí Guerrero Cots | L'Hospitalet (Barcelona) |
| 123. | Rosalía Desiré Rahona | » » |
| 124. | Ramón Fernández Jurado | Castelldefels (Barcelona) |
| 125. | Pilar Gómez Cansino | » » |
| 126. | Restituto Albero García | Burjasot (Valencia) |
| 127. | Eduardo Larrouy López | Bilbao |
| 128. | Carmen Norabuena de Larrouy | » |
| 129. | Santiago Mulas Gallego | Gijón |
| 130. | Susana Mulas Roces | » |
| 131. | Angel Figuerola Auque | Madrid |
| 132. | Marcelina Palomo Herrero | » |
| 133. | Jaume Aragay Pujols | Barcelona |

| N.° | Aliginto | Urbo-lando |
|---|---|---|
| 134. | Salvador Aragay Galbany | |
| 135. | Cresimir Polak | Zagrebo (Jugoslavio) |
| 136. | Pierre Sevilla | Francia |
| 137. | Yvonne Sevilla | » |
| 138. | Juan Azcuénaga Vierna | Santander |
| 139. | Vicente Mateo y Martínez | Zaragoza |
| 140. | M.ª Pilar Echevarría Guiu | » |
| 141. | M.ª José Montoto Sarriá | Sevilla |
| 142. | Amador Díaz | Southampton (Britio) |
| 143. | Muriel de Díaz | » » |
| 144. | Giordano Moya Escayola | Terrassa |
| 145. | Dolores Teixidó Melero | » |
| 146. | Jordi Barba Moya | » |
| 147. | Avigail Mesulam | Israel |
| 148. | Inés Pérez Leal | Sevilla |
| 149. | Nakamura Hideo | Uzi (Japón) |
| 150. | M.ª Balsera Lledó | Alicante |
| 151. | Ana M.ª Molera Urgellés | Moiá (Barcelona) |
| 152. | José Fernando Soler Sempere | Valencia |
| 153. | M.ª Dolores Fortea Lloret | » |
| 154. | Víctor Ortiz Gratal | Zaragoza |
| 155. | Luis M.ª Hernández Yzal | Sant Pau D'Ordal |
| 156. | Teresa Massana Rafols | » » » |
| 157. | Manuel Manteca López | Málaga |
| 158. | Francisco Ramírez Baldoví | Almussafes (Valencia) |
| 159. | M.ª Grau Magraner | » » |
| 160. | Felicidad Martínez Giralda | Valladolid |
| 161. | Domingo Domenech Savall | Valencia |
| 162. | Elías Domenech Savall | » |
| 163. | Victoriano Márquez de la Vera | Sevilla |
| 164. | Victoriano Márquez | » |
| 165. | Jesús Pérez Caballero | La Línea (Cádiz) |
| 166. | M.ª Fernández Medina | » » » |
| 167. | José M.ª Rodríguez Hernández | Córdoba |
| 168. | Sociedad esperantista «ESTO» | La Laguna (Tenerife) |
| 169. | Tomás Debowski | Polonia |
| 170. | María Díaz de la Fuente | Sevilla |
| 171. | José María Fernández de Liencres | » |
| 172. | Augusto Casquero de la Cruz | Madrid |
| 173. | Augusto Casquero Ballester | » |
| 174. | José Añó Belda | Valencia |
| 175. | Juan de Dios de Sarriá Sopeña | San Fernando (Cádiz) |
| 176. | Eduardo Padrao | Portugal |
| 177. | Francisca Carrasco García | El Puntal (Sevilla) |
| 178. | Dolores Carrasco Hernández | » » » |
| 179. | Juan Navareño Fernández | Madrid |
| 180. | Rafael Pleguezuelos González | Córdoba |
| 181. | Francisco Pérez Cruces | Sevilla |
| 182. | José Pina Tuells | Murcia |

## HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1a. | — | Jaro | 1920a | en | BARCELONA. |
| 2a. | — | » | 1921a | » | ZARAGOZA. |
| 3a. | — | » | 1923a | » | VALENCIA. |
| 4a. | — | » | 1924a | » | BILBAO. |
| 5a. | — | » | 1925a | » | CORDOBA. |
| 6a. | — | » | 1926a | » | MADRID. |
| 7a. | — | » | 1928a | » | SEVILLA. |
| 8a. | — | » | 1929a | » | OVIEDO. |
| 9a. | — | » | 1930a | » | MADRID. |
| 10a. | — | » | 1933a | » | SANTANDER. |
| 11a. | — | » | 1936a | » | BARCELONA. |
| 12a. | — | » | 1951a | » | TARRASA. |
| 13a. | — | » | 1952a | » | VALENCIA. |
| 14a | — | » | 1953a | » | BILBAO. |
| 15a. | — | » | 1954a | » | ZARAGOZA. |
| 16a. | — | » | 1955a | » | GIJON. |
| 17a. | — | » | 1956a | » | BARCELONA. |
| 18a. | — | » | 1957a | » | MADRID. |
| 19a. | — | » | 1958a | » | CASTELLON DE LA PLANA. |
| 20a. | — | » | 1959a | » | MALAGA. |
| 21a. | — | » | 1960a | » | PONTEVEDRA. |
| 22a. | — | » | 1961a | » | PALMA DE MALLORCA. |
| 23a. | — | » | 1962a | » | VALLADOLID. |
| 24a. | — | » | 1963a | » | BARCELONA. |
| 25a. | — | » | 1964a | » | VALENCIA. |
| 26a. | — | » | 1965a | » | PALENCIA. |
| 27a. | — | » | 1966a | » | BILBAO. |
| 28a. | — | » | 1967a | » | ZARAGOZA. |
| 29a. | — | » | 1969a | » | LA LAGUNA. |
| 30a. | — | » | 1970a | » | MIERES. |
| 31a. | — | » | 1971a | » | ALICANTE. |
| 32a. | — | » | 1972a | » | VIGO. |
| 33a. | — | » | 1973a | » | MADRID. |
| 34a. | — | » | 1974a | » | VALLADOLID. |
| 35a. | — | » | 1975a | » | LERIDA. |
| 36a. | — | » | 1976a | » | EL FERROL. |
| 37a. | — | » | 1977a | » | SABADELL. |
| 38a. | — | » | 1978a | » | LEON. |
| 39a. | — | » | 1979a | » | GIJON. |
| 40a. | — | » | 1980a | » | MADRID. |
| 41a. | — | » | 1981a | » | MURCIA. |
| 42a. | — | » | 1982a | » | MALAGA. |
| 43a. | — | » | 1983a | » | ZARAGOZA. |
| 44a. | — | » | 1984a | » | SEVILLA. |

MEMORNOTOJ:


0909